

ESPERANTO-POST

MONATSSCHRIFT FÜR DIE ESPERANTO - FREUNDE IN DEUTSCHLAND

Dritter Jahrgang



Nr. 5, Majo 1950

Parizo, la lum-urbo

La alproksimiĝanta tria Pariza Esperanto-Kongreso Universala, la 35-a laŭvice, altiras pli forte ol iam la atenton de ĉiuj tiuj, al kiuj ne estas eble, kiel antaŭ 18 jaroj, paki siajn valizojn kaj: ek al la stacidomo! Tiam, kun relativa facileco estis haveblaj vizoj kaj biletoj al celoj translimaj, kvankam la ideala stato de antaŭ 1914 neniam plu estis reatingita, nome ke nek limoj nek devisoĵaris la vojon al vojaĝemuloj ĉiuspecaj.

Kion oni faras, kiam oni pro diversaj kaŭzoj nenion povas fari? Oni prenas landkarton kaj vojaĝas perkrajone; aŭ, pli interese, oni elserĉas la numerojn de la siatempa „Gazeto de la XXIVa“ supoze ke feliĉa sorto ilin restigis kaj konservis kontraŭ la prenemo de paperbrokantisto aŭ eĉ pli, kontraŭ tio, ke bomboj kaj fajroj kaj mizero ne forrabis ilin. Ni ekzemple havas ankoraŭ la plej multajn el tiuj interesaj kajeroj, kaj por plezuro de la bedaŭrindaj ne-kongresi-povontoj kaj por instruo de la feliĉaj partoprenantoj ni komunikos al vi, kion ekzemple en la unua numero Jan Kostecki tiam diris pri

PARIZO POR KOMENCANTOJ.

Gesinjoroj, mi havas la taskon diri al vi kelkajn vortojn pri Parizo, nia nunjara kongresurbo. Tio estos nur kelkaj modestaj rimarkoj de eksterlandano, kiu havis la plezuron vivi en tiu urbo dum kelke da jaroj kaj iomete observi ĝin.

Por skribi kompetente pri la *Ville Lumière*, oni devas esti ne nur franco, sed esti Victor Hugo, kaj eĉ . . . vi certe renkontos personojn, kiujn Victor Hugo ne kontentigis.

Parizo estas agrabla loko por resti en ĝi. Se vi vizitas ĝin unufoje, vi facile konvikiĝas pri tio. Se vi jam estis tie, oni ne bezonas tion diri al vi. En Parizo estas agrable manĝi kaj trinki (ĉar oni konsumas bonajn produktojn), estas agrable promeni (ĉar ĉie vi rimarkas ion belan aŭ interesan), kaj estas agrable resti hejme (ĉar vi estas ĉirkaŭita de plaĉaj kaj utilaj objektoj guste dislokitaj). Tie estas ankaŭ agrable fari aliajn aferojn, laŭ propraj inspiro kaj respondec. Mi

tamen devas konfesi al vi, ke mi renkontis personojn, kiuj ne estas kontentaj. Ili diris, ke ili manĝis malbone, kaj ke la stratoj estas malpuraj. Nu, por havi konvenan menuon, oni devas elekti ĝin, laŭ sia stomako. Al ĉiuj taŭgas la sekvanta:

Buljono *Consommé*; Omeleto (ovaĵo) *Omelette nature*; Bovida kotleto *Côte de veau*; Pizoj *Petit pois*; Kompoto *Compote*; Fruktoj *Fruits*.

Francajn vinojn (la ruĝajn kaj la blankajn) iu ajn povas trinki sendaŭgere. Vi faros saĝe, se vi uzos abunde da ili, kaj evitos *apéritifs* kaj *liqueurs*, kiuj, se ili intensigas vian gajeton, samtempe tamen malgrandigas vian perceptkapablon.

Kaj, pri la stratoj mi respondis: Kial vi rigardas nur tion, kio estas sub viaj piedoj? Rigardu ankaŭ iom ĉirkaŭ vi kaj, iafoje, super vi!


Vi devos unue rigardi super vi, kiam vi volos vidi la Eiffel-turon. La Eiffel-turo estas monumento vere vidinda, antaŭ ĉio alia, de ĉiu eksterlandano noveveninta Parizon. Eĉ pursanga Usonano de Novjorko eksantas antaŭ ĝi intiman emocion. Kaj mi subaŭdis, ke dum la kongrestagoj la turo suportos la verdan flagon. Notu tamen, ke je tiu alteco de tricent metroj la koloroj jam ofte miksiĝas.

Kiam vi estos satiginta viajn okulojn rigardante sub viajn piedojn de la supro de l' turo, vi povos

mal supreniri ĝin. Per lifto aŭ piede. Sed mi avertas: estis iam kun mi ĉe la supro eminenta esperantisto, kiu decidis malsupreniri piede. Uzinte mem la lifton, mi sube dum unu horo atendis lin vane. Kiam ni renkontiĝis post kelkaj tagoj, ni ambaŭ (pro ĝentileco) ne aludis plu tiun ekskurson.

Malgrimpite sukcese la turon, kontenta pri la bone plenumita devo, vi povos komenci viziti la urbon. Vi rekonstatos tiam, ke homoj, kiuj ŝajnis formikoj, havas proksimume vian propran staturon. En Parizo vi renkontos certe individuojn de ĉiuj rasoj kaj haŭt-

(Daŭrigo sur p. 34)



Parizo kaj ĝia unua vidindaĵo: la Eiffel-turo

Kiel Esperantisto en Italujo

Romo dum la Sankta Jaro

Homamasoj el ĉiuj nacioj moviĝas tra la stratoj. Antaŭ ĉiu konstrajo, kiu posedas nur iom da arta valoro, oni trovas kriemajn fremdulvidantojn, kiuj parolas (aŭ balbutas) en deko da lingvoj. En tiu internacia medio ankaŭ troviĝis „la strangaj verdsteluloj“ — la unuaj Germanaj esperantistoj, kiuj post la milito sukcesis vojaĝi Italujon.

En la granda halo de tutnove konstruita loĝejo por pilgrimantoj regis bruo kaj ekscito; estis jam ege malfacile telefoni tie. Sed mi tamen provis. Je mia granda miro aŭdiĝis klara infanvoĉo, kiu tiel rapide respondis miajn demandojn, ke mi preskaŭ ne povis paroli pro konsterniĝo. Do, mi ĝojis, baldaŭ kontaktiĝi kum tiu „tutverda familio“.

Afable policisto gvidis min tra la senfinaj siratoj, flankitaj de blankaj modernaj domegoj, al unu el tiuj kolosoj. Nun mi povis konstati, ke estis eĉ du knabetoj, kiuj ek de sia naskiĝo parolis Esperanton kiel duan lingvon. La infanoj vere senerare parolis nian lingvon, kaj la patro konfirmis, ke ili pli multe uzas la „verdan lingvon“ ol la Italian. Sed ili ja ankaŭ havas okazon paroli. Ili montris al mi libron, en kiu la multaj vizitintoj sin enskribis per salutoj. Rajte ili povas fieri pri tio, ke ili povas senĝene paroli kun tutmondanoj. Ni ankaŭ multe parolis pri la Esperanto-movado en Germanujo, kiu estas tre alte taksata tie. Lingvaj malfacilaĵoj, pri kiuj mi povus citi multajn, inter samideanoj ne ekzistis.

Antaŭ la tramhaltejo du suspektemaj homoj diris unu al la alia:

Parizo (Daurigo d p. 33)

koloroj, kaj ankaŭ viajn samlandanojn. Sed la plej multnombraj estas tamen la francoj. Mi ne dubas ke, venante en la ĉefurbon de Francujo, vi ŝatos ilin ekkoni. Vi rimarkos facile, ke la francoj estas ĝenerale popolo tre ĝentila kaj diskreta. Ili kutime ne faros multe da bruo ĉirkaŭ sia persono. Tial por fari konatecon, vi la unua montrus intereson. Kaj, plej ofte, vi estos poste tute kontenta.

Por la personoj, venantaj el tre malproksimaj landoj (Esperantujo ekzistas ja ĉie), ŝajnas utile aldoni, ke Francujo estas jam delonge respubliko. Kvankam do vi nomas kelneron en restoracio kaj serviston en hotelo *garçon* (knabo), bonvolu memori, kara antipodulo, ke ili estas samrajtaj personoj kiel vi mem.

Vi povas iam ankaŭ, simpatia leganto, se vi venas el la puritanaj terpartoj, kie vortoj korespondas ekzakte al agoj, esti ĝenita pro libereco de esprimoj. Tiam konsi-

„Jen du Sovetianoj“. Sed la respondo trafe asertis: „Ho, neniam fariĝu lokomotivisto, se vi ne povas diferencigi verdan kaj ruĝan lumojn.“ Tiu ekzemplo de strangaj opinioj ne estis la sola. Ekzemple aliokaze servema ŝoforo intencis veturigi min rekte al la Izraela konsulejo.

Tre bedaŭrinde tiaj vojaĝoj restas ankoraŭ maloftaj por Germanoj. Sed ni ja ĉiuj esperas, ke baldaŭ ŝanĝiĝos la tempoj. R. S.

Kiel Esperantisto en Grekujo

En 1941 mi estis kiel soldato en Ateno. Mi staris antaŭ kiosko. La vendiston mi demandis pri iu objekto, kiun mi volis aĉeti. Unue mi parolis germane. Li ne komprenis min. Mi nun demandis france: „Parlez-vous français?“ Neniu respondo. „Do you speak english?“ Neado per la kapo. Mi demandis denove, nun esperantlingve: „Cu vi parolas Esperanton?“ La vendisto denove kapneis.

Sed por li respondis alia, kiu staris apud mi antaŭ la kiosko. Estis greka Esperantisto, kiu nun helpis min en la aĉeto.

Grandan ĝojon ni ambaŭ havis. Du horojn ni poste promenis tra Ateno. La greka samideano montris al mi la belan kaj grandan urbon. Bedaŭrinde mia servo revokis min. Ni devis adiaŭi.

Du samideanoj, greka Esperantisto el Saloniko kaj germana Esperantisto el Dresdeno, renkontis sin en Ateno kaj parolis la fratan lingvon Esperanto. La greka Esperantisto konis la iaman grandan firmaon *Ader & Borel* en Dresdeno, kies bonaj Esperanto-libroj ankaŭ al Grekujo estis senditaj.

Vejno

deru, ke iom da rido estas afero utila al bona digesto. Sed gardu vin, ke vi ne prenu la ŝercojn serioze aŭ, precipe, ke vi ne volu superi per sprito la Parizanon. Tio sukcesas nur tre malofte kaj al tre malmultaj esceptuloj post longa kaj klopodiga studado.

Kiam vi estos farinta la neceson por prepari vian sintenton kontraŭ homoj, vi devas pripensi vian sintenton kontraŭ aŭtomobiloj. Principe ili iras pli rapide ol vi. Se vi transiras straton, rigardu maldekstren ĝis la mezo de la vojo, poste rigardu dekstren. Sed en kelkaj stratoj la veturiloj venas ĉiam de la sama direkto. En pli trafikplenaj lokoj, vi sekvos la vojon inter grandaj blankaj najloj, se vi ne volas havi malagrablaĵon kun policano. Cefe, neniam perdu la kapon, ne tro rapide, restu kuraĝa, kaj vi konstatos, ke tiu sporto prezentas ankaŭ certan ĉarmon. Sed mi petas, ne venu Parizon per via propra aŭtomobilo. Ni havas ĉi tie sufiĉe da ili.

BANTU-Sprachnormung

Als internationale Sprache . . .
Esperanto?

Wie stehts damit in Afrika?

Auch Afrika hat seine Sprachenprobleme. Sogar sehr große. Die dort vertretenen Sprachen werden von fünf Volksgruppen gesprochen. Im südlich des Äquators gelegenen Teil sollen mehr als 200 Sprachen gesprochen werden! Es kommt da hauptsächlich die Bantu-Familie in Betracht. Viele Bantu-Gelehrte, u. a. Dr. Jakob Nhlapo, Leiter des Wilberforce-Instituts (Schule) in Transvaal, Süd-Afrika, wünschen eine Schreibform für verschiedene Dialekte. In Rhodesien ist das schon mehr oder weniger erreicht. Eingeborenenkinder beginnen damit, daß sie ihren Dialekt lesen und schreiben lernen (z. B. Cikaranga), aber vom vierten Schuljahr an lernen sie die übergeordnete Sprache von vier Dialekten, das Uni-Schona (englisch: Union Shona).

Die Missionare haben schon vor 25 Jahren die ganze Bibel in das Cikaranga übersetzt, aber sie war noch nicht gedruckt. Man entschied sich später für Uni-Schona und unternahm eine ganz neue Übersetzung in diese Sprache. Sie ist beinahe von der Britischen und Ausländischen Bibel-Gesellschaft beendet.

Man schuf außerdem eine Mischung der Bantu-Sprachen und nannte sie Basic Bantu oder Fanakalo. Ob dieses Basic Bantu jemals Bedeutung erlangen wird, kann niemand vorhersagen.

Ich dachte schon so manches Mal über den Wert von Esperanto als Lösung des Sprachenproblems in Afrika nach und sprach darüber auch mit eingeborenen Lehrern. In vielen Teilen Afrikas müssen diese Englisch lernen, in anderen Portugiesisch, Französisch, Afrikaans usw. Das Englische ist für sie recht schwer, besonders die Aussprache. Und doch lernen sie es. Warum?

Weil die englische Sprache ein außerordentlich wichtiges Zugangstor zu den wissenschaftlichen Schätzen der Welt ist. Englische Bücher sind zudem billiger als gleichwertige anderer Sprachen. Und das Wichtigste für den Eingeborenen ist jetzt, alles Wissen sich anzu eignen, das ihm von praktischem Nutzen sein kann. Deshalb schreitet die Ausbreitung von Esperanto unter ihnen nicht wesentlich voran.

J. Semmelink, Rhodesien
(Aus „Esperanto“)

In dieser Nummer:

Parizo — la lum-urbo
Als Esperantist in Italien und
Griechenland
Bantu-Sprachnormung
Fremdplanedanoj
en „flugantaj subtasoj“
Die Rehtz-Ecke
Lingva Konsilejo —
Lingva Konsultejo
Der Büchertisch
Enigmoj — Sercoj — Penso-
sporto

Fine de Majo en Majenco, nia nunjara germana kongres-renkontejo!

La grandaj Figuroj de l' Homaro en la kadro de la kalendaro

MAJO

- En tiu ĉi monato naskiĝis**
- 1265 **Dante Alighieri** — plej fama itala poeto
- 1471 **Albrecht Dürer** — granda germana pentristo kaj gravuristo
- 1686 **Gabr'el Daniel Fahrenheit** — germana fizikisto
- 1758 **Maximilien Robespierre** — franca revoluciulo
- 1760 **Johann Peter Hebel** — germana (alemana) verkisto
- 1762 **Johann Gottlieb Fichte** — germana filozofo
- 1772 **Friedrich von Hardenberg (Novalis)** — romantika poeto germana
- 1773 **Ludwig Tieck** — romantika poeto germana.
- 1779 **Thomas Moore** — angla poeto kaj verkisto
- 1788 **Friedrich Rückert** — lirika poeto kaj tradukisto germana
- 1799 **Honoré de Balzac** — granda franca romanverkisto
- 1803 **Justus von Liebig** — germana kemiisto
- 1803 **Ralph Waldo Emerson** — usona filozofo kaj poeto
- 1813 **Richard Wagner** — operkomponisto germana
- 1818 **Karl Marx** — germano, kreinto de l' scienca socialismo
- 1833 **Johannes Brahms** — germana komponisto
- 1840 **Alphonse Daudet** — franca poeto-verkisto
- 1849 **Pjotr Ĉajkovskij** — plej granda rusa komponisto
- 1853 **Vincent van Gogh** — nederlanda pentristo
- 1862 **Arthur Schnitzler** — aŭstra kuracisto kaj poeto
- 1871 **Christian Morgenstern** — germana poeto
- 1896 **Hans Pfitzner** — germana operkomponisto

En tiu ĉi monato mortis

- 1506 **Cristoforo Colombo** — italo, eltrovinto de Ameriko
- 1519 **Lionardo da Vinci** — universala geniulo itala
- 1543 **Nikolaus Kopernikus** — fondinto de la nova astronomio
- 1564 **Johannes Calvin** — svisa religia reformatoro
- 1594 **Jacopo Robusti nomata Tintoretto** — itala pentristo
- 1640 **Peter Paul Rubens** — flandra pentristo
- 1681 **Pedro Calderón de la Barca** — hispana dramverkisto
- 1686 **Otto von Guericke** — germana fizikisto, inĝeniero kaj juristo
- 1770 **François Boucher** — franca rokoko-pentristo

- 1778 **François Marie Arouet Voltaire** — franca historiisto, filozofo kaj poeto
- 1805 **Friedrich Schiller** — klasika poeto-verkisto germana
- 1809 **Joseph Haydn** — aŭstra komponisto.
- 1821 **Napoléon Bonaparte** — plej granda imperiestro de la francoj
- 1840 **Caspar David Friedrich** — romantika pentristo germana
- 1848 **Annette von Droste-Hülshoff** — germana poetino
- 1849 **Otto Nicolai** — germana operkomponisto
- 1857 **Alfred de Musset** — franca poeto
- 1864 **Giacomo Meyerbeer** — german-franca operkomponisto
- 1871 **Daniel François Auber** — franca operkomponisto
- 1883 **Edouard Manet** — franca pentristo
- 1884 **Jendrich Smetana** — ĉeĥa komponisto
- 1885 **Victor Hugo** — franca poeto
- 1904 **Anton Dvořak** — ĉeĥa komponisto
- 1906 **Henrik Ibsen** — norvega poeto
- 1911 **Gustav Mahler** — germana komponisto
- 1912 **August Strindberg** — sveda verkisto
- 1916 **Max Reger** — germana komponisto
- 1918 **Ferdinand Hodler** — svisa pentristo
- 1930 **Fridtjof Nansen** — arkta esploristo kaj zoologo norvega.

Rimarkigo. Eble tiu aŭ tiu el niaj gelegantoj diros: Jen sufiĉe enuiga listo! Ĉu tiel pensas ankaŭ vi? Bonvolu revizii vian trrapidan juĝon! Kiom da homsortoj troviĝas en tiu ĉi nomaro, kiom da diversaj karakteroj, kiom da talento, da genio! Prenu iun ajn el la listo kaj studu iomete lian vivon — abunde vi trovos en ĝi plej varian faskon da vivkoloroj, da sortospecoj, da ĝojoj kaj suferoj! Vi trovos en ĉiu el ili tion, kion ni bezonas tiel urĝe: homecon! — Fine, se precipe niaj junaj gelegantoj lernas el la listo kelkajn gravajn datojn kaj niaj pli maljunaj refreŝigas ilin, ĉu tio ne estas ankaŭ bona fako?

La kompilinto.

Aufblick zum Sternenhimmel

Es haben leider nicht viele Leser als „Schiedsrichter“ über die eingesandten Gedichtsübertragungen wirken wollen. Selbstverständlich hat die Redaktion auch deren Urteil bei ihrem Schiedsspruch berücksichtigt. Als die drei besten Arbeiten gelten die von W. L. B., P. Ch. St. und A. R. H. Teo Jung schreibt dazu:

„Laŭ mia opinio W. L. B. meritas la „palmon“, ĉar li (ŝi) uzas la saman ritmon kaj analogajn rimojn kiel la originalo, kaj lia retraduko estas sufiĉe proksime al la originalo, kvankam kelkaj esprimoj sonas iom banale. Tamen la tradukoj de A. R. H. kaj P. Ch. St. estas preskaŭ samvaloraj. Sed A. R. H. havas rimojn nur ĉe ĉiu dua verso. Ankaŭ E. B. E. kaj J. R. H. estas ne malbonaj, sed la ritmo estas malsama al la originalo kaj neregula en diversaj strofoj. La angla traduko de E. S. K. ŝajnas al mi bona, malgraŭ ĝia arbitra ritmo; sed mi scias la anglan lingvon ne sufiĉe por povi kompetente juĝi pri tiu traduko.“

Dieses Urteil ist auch das der Redaktion und einiger Leser. Ein Leser meint, die Gedichte seien schon ihrer Güte nach geordnet gedruckt worden. — Nein, in der Reihenfolge ihres Eingangs.

Die Auslosung der Prämien ergab: A. R. H. und W. L. B. je ein Vierteljahresbezug der EP, P. Ch. St. 1 Exemplar „La mistero de l' sango“.

Und wie ist das allgemeine Ergebnis? — Teo Jung schreibt: „La eksperimento sukcesis pli bone ol mi supozis, kaj la pruvo, kiun vi intencis liveri, estas farita.“

Und damit kann die EP wohl zufrieden sein.

Zum Schluß noch die vollen Namen der Teilnehmer:

1. A. R. H. = Alfred Rehtz, Hamburg
2. P. Ch. St. = Paul Christaller, Stuttgart
3. W. L. B. = Walter Latsch, Barsinghausen
4. E. B. E. = Emilie Buchty, Eschweiler
5. J. R. H. = Johannes Radam, Heikendorf
6. E. S. K. = Erna Setzwein, Kollnburg
7. Esperanto-Übersetzung (in EP Nr. 1/1950) = Joseph Berger, Köln.

Bitte berichtigen Sie: Im englischen Text: Erstes Wort der 4. Strophe muß heißen: if (nicht: is).
In der Originalfassung von Teo Jung: 2. Strophe, 1. Wort des 2. Verses: Schauernd (nicht: Schauernd).

VIZITU LA KONGRESON EN MAINZ!

II. Wortstämme. Wortbildung

Die meisten Stammwörter des Volapük sind einsilbig. Ungefähr $\frac{1}{3}$ gehört der englischen und $\frac{1}{4}$ der deutschen Sprache an, $\frac{1}{4}$ wurde dem Latein und dessen Tochtersprachen und der Rest andern lebenden Sprachen entnommen. Das Verhältnis ist also 33:20:25:22. Jedes Wurzelwort muß kurz und leicht auszusprechen sein und der grammatischen Regel, daß alle Wörter mit einem Mitlaut beginnen und enden müssen, genügen, z. B. lob das Lob, zug = der Zug. Jede Häufung von Mitlauten wird vermieden, daher men = der Mensch, fal = der Fall. Das den Chinesen unbekannt r wird gewöhnlich durch l ersetzt oder ganz weggelassen. Klon = die Krone, bel = der Berg, glamat = die Grammatik, plovin = die Provinz. Vol (englisch world) = die Welt. (w wird v, r fällt weg, d ebenfalls wegen Konsonantenhäufung); ebenso pük (englisch speak; sp als Konsonantenhäufung wird zu p vereinfacht, ea (-i-) ergibt hier ü, da pik = der Hecht! heißt.) Also pük = die Sprache.

Durch die Regel, daß alle Stammwörter mit einem Mitlaut beginnen und enden müssen, ferner durch allzu große Kürzung der Urwörter sowie dadurch, daß r oft verschwindet oder in l verwandelt ist, wurde der Ursprung vieler Wörter vollständig verwischt.

Aus den Wurzelwörtern werden neue Wörter gebildet:

1. Durch Wortzusammensetzungen mit Hilfe der Vokale a, o, i; z. B. ban-a-cem = Badezimmer, gud-o-pen-ön = gutschreiben, it-i-lesev = Selbsterkenntnis.

2. Durch Veränderung von Vokalen oder Konsonanten; z. B. blam = Tadel, bläm = Blamierung, buk = Buch, bük = Buchdruck, duk = Führung, dük = Führer, Herzog, dug = Leitung, Lenkung.

3. Durch den Umlaut wird das Wort „eben“ ausgedrückt; z. B. at = dieser, ät = ebendieser, ut = derjenige, üt = ebenderjenige, som = solch, söm = ebensolch.

4. Die Dauerform-Partikel ai und die Zeitbildungsvorsilben a, ä, e, i, o, u werden nicht nur bei Zeitwörtern, sondern sogar vor anderen Wörtern gebraucht; z. B. ai-nog = immer noch, ai-dun-ön = immer tun, pflegen, (neito = nachts) a-neito = heute Nacht, ä-neito = gestern Nacht, e-neito = vorgestern Nacht.

5. Durch Vor- und Nachsilben. Man unterscheidet

- grammatische Ableitungssilben;
- allgemeine Ableitungssilben;
- Ableitungssilben, die für bestimmte Vor- und Nachsilben gesetzt werden.

Als Stammwörter des Esperanto wurden diejenigen Wortstämme gewählt, die den meisten europäischen Sprachen gemeinsam sind. Für Begriffe, die in diesen Sprachen keine gleichen oder ähnlichen Stämme aufweisen, wurden solche Wortwurzeln genommen, die sich im Bau des Esperanto am zweckmäßigsten verwenden ließen. Die Laute ä, ö, ü, die französischen und polnischen Nasenlaute, das englische th usw. kommen im Esperanto nicht vor.

Bei den Stamm-(Wurzel)wörtern unterscheidet man

1. solche, die, um ihr bestimmtes Merkmal als Wort zu erhalten, eine die Wortklassen bezeichnende Endung annehmen, und zwar: o für das Hauptwort, a für das Eigenschaftswort, e für das Umstandswort und i für das Zeitwort (Nennform). Unter „Grammatik“ lernten wir bereits patr- und am- als Beispiele kennen; nur ein weiteres sei angeführt: kur-; kuro = Lauf, kura = laufend, kure = im Lauf, kuri = laufen;

2. solche, die, ohne eine bestimmte Endung anzunehmen, bereits einer Wortklasse angehören, wie der Artikel, die Fürwörter, die Zahlwörter, die Verhältniswörter, die Bindewörter usw.

Die Wörter können, wenn logisch möglich, durch Annahmen der unter 1. genannten Endungen in jene Wortklassen eingereiht werden, z. B. jes = ja, jeso = Bejahung, jesa = bejahend, jesi = bejahen; kun = mit, kune = zusammen usw.

Ferner werden Wörter gebildet

1. durch Aneinanderreihen; das Grundwort kommt an den Schluß; z. B. vapor-ŝipo = Dampfschiff, vin-glaso = Weinglas, buter-pano = Butterbrot, en-salti = hineinspringen, preter-iri = vorbeigehen usw.

2. Durch Vor- und Nachsilben.

- grammatische Bildungssilben,
- Wortbildungssilben.

(Wird fortgesetzt.)

Die Schulen warten

Im Lehrerzimmer saßen
Noch der Kollegen zwei:
„Laß doch die dummen Hefte!
Die Stunde jetzt ist frei.“
„Nein! Dieses Korrigieren
Besorg' ich möglichst hier
Und nicht in meiner Bude.
Das ist Prinzip bei mir.“

Die Englisch-Arbeit heute
War gräßlich wiedermal.
Die Willkür in der Schreibung
Macht ja den Kindern Qual.
Daß dieses Esperanto
Auch mal im Lehrplan steht,
Die schöne, leichte Sprache —
Das ist mein Stoßgebet.“

Bei diesem Esperanto,
Das Torheit „künstlich“ nennt,
Da sind die jungen Köpfe
In ihrem Element:
Sie dürfen, auf die Logik
Gestützt, selbst Worte bau'n
Und den paar klaren Regeln
In jedem Fall vertraun.

In einer Falkengruppe
Hab' ich es ausprobiert,
Wie schnell und wie begeistert
Die Jugend da studiert.
Das würd' bei unsern Kleinen
Hier auch nicht anders sein. —
Erwache, Schulbehörde!
Führ' Esperanto ein!

Übersetzungsaufgabe Nr. 15

Selbst verfertigter Weltbürgerpaß

Im Hafen von Hobart (Tasmanien) landete der deutsche Weltbürger Georg Dibbern mit seinem Segelboot nach einer Seereise von einigen tausend Kilometer. Er legte den Hafenbehörden einen selbstverfertigten Paß vor, der anerkannt wurde.

In diesem Schriftstück heißt es u. a.: „Ich bin ein Weltbürger und Freund aller Völker. Ich respektiere die Gesetze aller Nationen.“

Dibbern führte auf seinem mit zwei Australiern und einem Neuseeländer bemannten Boot eine eigene Flagge: ein rotes Kreuz auf blauem Kreis mit weißem Hintergrund und einem blauen Stern in der linken Ecke.

Bescheidene Anfrage: Versteht der Weltbürger Dibbern als „Freund aller Völker“ auch alle ihre Sprachen? Und wie stellt er sich zu Esperanto?

In der nächsten Nummer:
(12-seitig!):

Nur ein Zehntausendstel!
Wie war's in Mainz?
El la tirkesto de la redakcio
Hella, Helga, Karl und Franz
Rivalen von ehemals
La grandaj figuroj...
Aktuala Terminaro
La EP-Rakonto

Spaziergang im Esperanto-Garten

Wußten Sie, daß *iam*, *kiam*, *tiam* usw. ursprünglich *ian*, *kian*, *tian* usw. lauteten? Da aber eine Verwechslung mit *ian* = *ia* + *n* des 4. Falles auf der Hand lag, änderte Dr. Zamenhof diese Tabellwörter auf *m* um.

Sagt man: *La homo, li* oder *ĝi*? Obwohl ein *ĝi*-Standpunkt vertretbar ist, hat sich der Sprachgebrauch für „*li*“ entschieden. Selbst Dr. Zamenhof gebraucht durchweg „*li*“. Dasselbe gilt für die Fürwörter *iu*, *tiu*, *ĉiu*, *neniu*; nur nach „*persono*“ finden wir bei unserem Meister „*ĝi*“; „*li*“ ist aber genau so richtig. Nach Sammelnamen wie *popolo*, *nacio*, *Societo* usw. steht stets „*ĝi*“.

Wie im Deutschen und Englischen, besitzt Esperanto für das „*si*“ der Mehrzahl für alle Geschlechter auch nur ein Wort: „*ili*“. Es gibt aber Fälle, besonders in Zamenhofs Bibelübersetzung, wo es durchaus unklar ist, ob mit „*ili*“ Frauen oder Männer gemeint sind. Schon vor langer Zeit hat man die erweiternde Form „*ĝi*“ vorgeschlagen; sie hat sich aber nicht eingebürgert. Es ist auch durchaus möglich, einem *homo* mit *vir-homo* bzw. *homino* näher zu bestimmen. In dem Satz „*ĉiu homo amas sin mem*“, faßt aber jeder ohne weiteres beide Geschlechter zusammen. Nach *infano* setzt man üblicherweise „*ĝi*“; Dr. Zamenhof betonte aber, daß man nach *infano*, falls es sich um ein „Männchen“ handelt, „*li*“ gebrauchen kann. Bei vermenschlichten Dingen und Begriffen (meist in Märchen) werden je nachdem *li*, *ŝi* und *ĝi* angewendet. Wir finden bei Dr. Zamenhof: *La fortuna, ŝi* — *La vintro, li* — *La gladilo, ĝi*.

Einige Verhältniswörter werden durch Anhängung eines *i* zu Tätigkeitswörtern mit der Bedeutung „sein“, z. B. *austataŭi* = an Stelle sein, *ĉirkaŭi* = um herum sein, *kontraŭi* = dagegen sein, *superi* = [dar] über sein. *Peri* tanzt aber aus der Reihe, denn es bedeutet nicht „durch sein“ (*esti per*), sondern „*esti tiu, per kiu la ago okazas*“. Wir müssen also hier eine Tätigkeitswurzel „*per*“ annehmen, von der *peri*, *pera*, *peranto* usw. abgeleitet werden.

Über den Charakter von „*aĵ(o)*“ sind sich manche im unklaren, weil in den meisten „kurzgefaßten“ Lehrgängen der „Fall“ mit wenig Erklärungen rasch abgetan wird. *Aĵo* ist erstens ein selbständiges Hauptwort und zweitens eine Nachsilbe. Einige Beispiele mögen Klarheit geben. *Aŭtomato, estas sprita aĵo* (witziges Ding), *sed ne spritaĵo* (Witz); *ne estas novaĵo* (Neuigkeit), *ke novaĵ aĵoj* (neue Sachen) *plaĉas*; *dolĉa vino estas dolĉa aĵo* (süße Angelegenheit), *sed ne dolĉaĵo* (Süßigkeit). Mit anderen Worten: eine *dolĉaĵo* ist eine *dolĉo-aĵo*, eine *dolĉo* (Süße), die *aĵo* (greifbare Sache) ist. Die Eigenschaftswortform *dolĉa* besagt, daß ein Ding (*aĵo*) die zufällige

oder gelegentliche Eigenschaft *dolĉa* besitzt, wohingegen die *aĵo*-Zusammensetzung *dolĉaĵo* die Ausdrucksform für eine beständige Wesenseigenschaft ist. M. Butin.

Prilingvaj glossoj

De Josef Sommer

Kritikante jen kelkajn lingvajn detalajojn, laŭhazardo elpikatajn el iuj gazetoj, mi bone konscias, ke pleje iuj eraroj ne estas gravaj kaj krome, ke mi mem tute ne estas perfektulo kaj tial ankaŭ pekadas. Miaj rimarkigoj do ne celas, esplorene sondi aliajn malfortajojn, sed, citante ekzemplojn mi deziras sugestii, ke ni legu kritike kaj ne blinde imitu, sed legante atentu, ĉu iu ideo aŭ penso ne povas esti esprimata pli taŭge kaj nature per alia dirmaniero.

Esperanto transprenis ne nur siajn vortojn el naturaj lingvoj kun iliaj mankoj kaj neperfektaĵoj, sed ankaŭ la tendencon rigidigi en sablonaj formoj, tiel ke, por vortigi iun penson, ni bezonas nur tiri la koncernen koston de la cerba provizejo por elpreni taŭgan stereotipon, kiun antaŭuloj jam pretigis por ĉiaj eblaj okazoj. Rilate al tio Goethe diris: „Wenn eine gewisse Epoche hindurch in einer Sprache viel geschrieben und in derselben von vorzüglichen Talenten der lebendige, vorfindene Kreis menschlicher Gefühle und Schicksale durchgearbeitet worden, so ist der Zeitgehalt erschöpft und die Sprache zugleich, so daß nun jedes mäßige Talent sich der vorliegenden Ausdrücke als gegebener Phrasen mit Bequemlichkeit bedienen kann.“ (Kiam en la daŭro de iu epoko en iu lingvo multo estas skribita kaj per ĝi de bonegaj talentuloj la vivekzistanta komplekso da homaj sentoj kaj sortoj estas priverkita, tiam fine la spiritsubstanco de la epoko estas elĉerpita kaj kun ĝi la lingvo. Do nun ĉiu mezkvalita talentulo oportune povas profiti la kreitajn esprimojn kiel fiksaĵojn.) Simile evoluigos ankaŭ Esperanto, des pli, ke ni ja inklina, senkonscie traduki el nia gepatra lingvo.

Tial ni komprenas, telestion verkitan de samlingvano pli facile ol tiun de alilingvulo.

Tamen Esperanto estas ankoraŭ tro juneca por jam nun malelastigi. Ĝia evolui-kapablo ankoraŭ ne estas elĉerpita; atenta leganto ofte renkontas vortaranĝon aŭ metaforon ĝis nun ne uzitajn, kiuj pli trafe, pli impresive kaj pli simple esprimas ideojn aŭ penson, ol li kutimis antaŭe. Al tiuj pli bonaj dirformoj devas cedi la ĝismunaj, eĉ se ĉi tiuj ŝajnas posedi la privilegion de longa tradicio.

En unu el siaj „Lingvaj Respondoj“ Zamenhof diras: „Vi estas prava; anstataŭ „*sidiĝu*“ estus pli bone diri „*sidigu vin*“ aŭ „*eksidu*“; tamen ĉar la formo „*sidiĝu*“ jam de tre longe estas uzata . . . tial ĝi fariĝis jam „*Esperantismo*“. Tia „*konserwatismo*“ rilate al formo ekkonita kiel nebona estas komprenebla por la tiama fazo (1906), en kiu reformemuloj abundis kaj la Idisma skismo, endanĝerigis la tutan helpingvan ideon. Tamen Zamenhof daŭrigis en la sama „*respondo*“: „La diferenco inter lingvo natura kaj lingvo artefarita konsistas en tio, ke dum en la unua oni devas uzi nur tiujn formojn, kiujn uzas bonaj verkistoj, kaj uzado de formo pli logika estas malpermesata, — en lingvo artefarita ĉiu havas la rajton uzi formon pli logikan, kvankam neniu ĝis nun ĝin uzis.“

„Dankon pro la varma akcepto flanke de la esperantistoj.“ Kiel en germana lingvo la formo „*seitens*“ jam ne estas rigardata kiel bonstila, sed kiel arkaikaĵo el iama kancelaria stilo, tiel ankaŭ en Esperanto la samsignifa „*flanke*“ estas malkonsilinda. Unuavice, ĉar „*flanko*“ jam sen tio havas pli ol unu signifon kaj plursenceco estas malbono kiom eble evitinda. Por eviti miskomprenon (akcepto de la esperantistoj), oni povas uzi pli taŭgan vorton: „*fare (de)*“. Mi scias, ke iaultaj antipatis tiun esprimon ankoraŭ ne uzitan en t. n. klasika Esperanto. Sed ĉu ĝi ne estas logika kaj bone komprenebla kaj solvas kontentige la demandon: kiel eviti konfuzon pri la multisenca „*de*“?

„Mi ne scias, ĉu la aplaŭdo estas la termometro de la intereso pri Esperanto.“ Zamenhof konsilas: „Uzu la artikolon *tiam*, *kiam* vi scias certe, ke ĝia uzado estas necesa“. Nu, la latina kaj slavaj lingvoj (escepte de la bulgara) ne posedas ĝin. En latinidaj kaj germana lingvoj artikolo estas nur malfortiginta demonstrativo (montra pronomo). La francaj „*le, la*“, Fortsetzung auf S. 38

Solvo de la traduktasko n-ro 14.

Oni fuŝparolis kiel eble plej sukcese

Komence de Marto 1950, antaŭ la asiza tribunalo de Akeno (Aachen), okazis traktado pro kontraŭlega limtransiro de Albano, Hungaro, Litovo kaj Luksemburgano. Ĝi estis karakterizata de vere babilonaj lingvo-malfacilaĵoj. La kvaroj — ministroj aŭ terkulturistoj — estis veninta el Francujo, por serĉi laboron en Germanujo. Ĉe la transpaŝo de la limo apud Akeno oni

kaptis ilin. Escepte de la Luksemburgano, neniu komprenis Germane. La Litovo sciis Anglan lingvon, sed ne sufiĉe sciis ĝin la tribunalaĵo, sed ne sufiĉe sciis ĝin la prokuroro. Fine oni interkonsentis uzi la Francan, kiun penige sciis fuŝparoli ĉiuj. (La juĝo estis: por ĉiu kvar tagoj da aresto.) — R i m. Pri la lingva fakto komentario ja estas vere superflua.

Kio estas tio? Nu, simple: loko, kie oni demandas, konsultas (kiel ĉe kuracisto) pri lingvaj problemoj, malfacilaĵoj, duboj. Ofte tia demando aperas subite ĉe legado; kutime oni malgraŭ serĉado en disponeblaj verkoj ne trovas kontentigan respondon, kaj tio kaŭzas memĉagrenon. Tial estonte agu jene: Turnu vin al la lingva konsultejo. Via demando havos numeron, kaj sub tiu ĉi numero aperos la respondo, ĉu tuj, ĉu en posta kajero, laŭ la cirkonstancoj. Respondo ĉiam nur finindaj lingvospertaj gesamideanoj; cetere tio estas memkomprenebla. Sed ni devas lasi al ili, ĉu ili respondo anonime, ĉu sub sia aŭtentika nomo.

Demando 1. La Esperanta vorto por la germana „nun“ estas, laŭ la vortaro, *nun*; kaj estas, kompreneble, adverbo. De la adverbo oni povas konstrui adjektivon *nuna*. Sed prof. M. ĉiam skribas *nun e kiel* adverbo. Kial?
E. F. S.

Demando 2. Kiel estas demando adverbo; la respondo, t. e. la montra adverbo, estas do tiel; sed vi skribas *tiel*. Kial? E. F. S.

Rimarko. Demandoj 1 kaj 2 devenas ankoraŭ el la unua periodo de EP.

Fortsetzong von S. 37

la italaj „il“ aŭ „lo“ kaj „la“, la hispanaj „el“ kaj „la“ devenas de la latinaj demonstrativoj „ille, illa“ = tiu. Pri la demando, kiam artikolo estas necesa, la opinioj do estos malsamaj. Sed kiu al ĝi kutimas de el sia gepatra lingvo, nur malvolonte ĝin rezignus. Tamen ni ĉiam memoru, ke la artikolo ne estas deviga en Esperanto kaj ke ĝia nenecesa aŭ eĉ troa aplikado estas teda pedanteco. Ĉu vi ne trovas, ke en la citita frazo almenaŭ dufoje la artikolo estas nebezona? Kaj cetere: ĉu ne „intereso“ plene sufiĉas? (... ĉu aplaŭdo estas termostro de (la) intereso por Esperanto.

„Dum mia vivo multe ŝanĝiĝis ankaŭ en tiu problemoj“. Jen do frazo, en kiu adverbo funkcias kiel subjekto. Nu, pri la vorto „multa“ ni gramatike ne estas severaj, tolerante ekz. ĝian pronoman uzon: „multaj diras, ke...“ Ja ĉi tie la vera subjekto estas subkomprenata: multaj (homoj). Kroma anomalio estas la specifa Esperantismo „multe da“. Sed ankaŭ ĉi tie la efektiva subjekto (aŭ objekto) estas esprimita, kvankam depende de „da“, do en gramatike nenormala formo. Ekzemple: Nemulte da similaj bienoj ekzistas (Z) (= nemultaj s. bienoj ekzistas). Tamen, ĉu oni estu tolerema ankaŭ rilate al la supre citita frazo? Mi opinias, ke ne. Ĉar ja tia formo prezentas nenian avantaĝon kontraŭ la regula: multo ŝanĝiĝis.

(Daŭrigota).

Demando 3. Kiel oni tradukas: Er spazierte mit seiner Dame im Foyer auf und ab? Pri la signifo de „sinjorino“ komparu la Plenan Vortaron.
H. W. K.

Demando 4. Bonvolu diri al mi traŝan esprimon por „Schlagzeile“.
J. B. K.

Demando 5.

Sur paĝo 80 de via gazeto (Nr. 11/12 de 1949) mi trovis sub la titolo „Infanaĵoj“ la vorton *uleto* kun la aldonita germana traduko „Kleiner Schelm“. Ankaŭ en la Liliput-vortaro de Schmidt & Günther oni trovas: *ulo* Kerl, *uleto* Knirps.

Laŭ mia opinio tio ne estas logika. La sufikso *ul* signifas personon kun speciale akcentinda kvalito aŭ eco, kiun faraĝ ekkonebla nur la antaŭmetenda radiko. Ekzemple blindulo estas persono, kiu estas blinda kaj kies blindeco en tiu rilato estas lia ĉefeco. Analoge oni formas la vortojn *fremdulo, avarulo, kontraŭulo* ktp.

Pro tio la vorto *ulo* sen antaŭmetita radiko estas tute malplena ideo, preskaŭ sensenca vorto; ĉar ĝi enhavas ja ne kiel aliaj pre- aŭ sufiksoj (ekz. *et, eg, id, il, uj* k. s.) iun sendependan signifon, sed celas nur akcenti la antaŭmetendan radikon. Do, eventuale oni rajtus uzi la vorteton *ulo*, se temas pri persono sen iu kvalito aŭ eco, kaj ĝuste tiu „senkvaliteco“ estas akcentinda. Sed al tiu ideo tute ne analogas la germana vorto „Kerl“. Daŭrigante tiun argumentadon mi opinias, ke la ideo *ulo* ne estas malgrandigebla kaj sekve *uleto* estas ĉiukaze sensenca respektive kontraŭlogika. Se iu persono estas *eta*, li havas ja certe ia kvaliton de malgrando, kaj se oni volas akcenti tiun kvaliton, oni diru *etulo* sed ne *uleto*. Do la vorto *etulo* samvaloras al la germana vorto „Knirps“. La komence citita germana traduko „Kleiner Schelm“ enhavas ĉiukaze pli ol la esperanta vorto *etulo* respektive *uleto*.

Interesus min eksci, kiel spertuloj de nia lingvo pensas pri tiu problemoj, kaj ĉu Zamenhof mem iam uzis la vortojn *ulo* aŭ *uleto*. Eventuale vi povas pritrakti la problemon en la Esperanto-Post. - H.M.

Antwort 5

— *ul(o)* ist in erster Linie Suffix (z. B. in *avarulo* usw.; auch *etulo* gehört hierher). Dieses Suffix wird aber auch als selbständiges Substantiv benutzt. Minor schreibt: „*Ulo* ist als selbständiges Substantiv nicht (sehr) gebräuchlich. Häufiger findet man *uleto* = Wicht, Männchen.“ Göhl drückt sich ähnlich aus: „*Ulo* = Person (unbestimmter Art), *uleto* = Wicht, Männchen.“ Plena Gramatiko sagt: „*ulo* signifas individuon karakterizatan de...“, do individuon *sen speciala karaktero*, personon malgravan, nekonsiderindan. Tial memstare ĝi havas *aĝigan* nuancon; tiel ĝi estas ja

uzata; ĝi estas preskaŭ *insulta* vorto. *Bela ulo* do estas senkarakterulo bela, dum *belulo* estas personiĝo de belo. Same: *bela ulino* kaj *belulino*.“ Plena Vortaro gibt an: „Sam-signifa memstara vortero: *ulo*, *dikmalulta ulo* (Zam.)“ Im Deutschen haben wir analog: „Na, du bist mir ja ein schöner Kerl!“ Zamenhof schrieb auch — verächtlich-lächerlich machend —: *dikmalulta ulo*. Er hat also *ulo* als selbständiges Hauptwort mit „aĝiga nuanco“ angewendet. Wenn nun *ulo* Daseinsberechtigung hat, darf man einem *uleto* keine Verbotstafel umhängen und muß das begriffsabschwächende *-et* hier zulassen.

In den „Infanaĵoj“ ist aber *uleto* falsch, wie s-ano M. richtig bemerkt; es muß *etulo* heißen, weil es mit obigem ironisch gebrauchten *ulo* nichts zu tun hat.

Ein *etulo* ist ein Knirps, ein Hosenmatz, ein Dreikäsehoch.

Ajn

„Irgeneiner hat mir gesagt“ mit „iu ajn diris al mi“ zu übersetzen ist falsch. Irgeneiner heißt *iu* und nicht mehr. Man begegnet diesem Fehler ausschließlich bei deutschen Esperantisten: Schuld trägt hauptsächlich der Gleichklang von „ein(er) und ajn“. — Man wendet aber „ajn“ im Esperanto ebenso selten an wie das entsprechende „auch immer“ im Deutschen: Kiu ajn = wer auch immer.
M. Butin.

Um ein Zitat

Mein Freund zeigte mir einen Satz von W. v. Humboldt: „Mit zunehmender Kultur nimmt die Sprachverschiedenheit ab.“

„Hm“, meinte ich, „Englisch und Russisch und Chinesisch sind doch ziemlich verschieden, unsere zunehmende Kultur scheint die Nationalsprachen immer mehr zu verfeinern und zu differenzieren.“

„Den Satz muß man umdrehen! Wenn die Sprachverschiedenheit einmal aufhört oder wenigstens abnimmt, dann haben wir zunehmende Kultur.“

Und dann fiel uns ein, daß heute doch schon manche Dinge in fast allen Sprachen zu finden sind, Atom und Auto, Motor und Bus, Theater und Musik, Telefon und Telegramm, Paß und Polizei, Radio und Demokratie, und viel, viel mehr. Also hat Humboldt doch recht.

Und wäre es nicht vernünftig, wenn wir diese Entwicklung bewußt fördern würden, nicht die Nationalsprachen vollpfropfen mit internationalen Fremdwörtern und volksfremden Redewendungen, sondern indem wir eine rationell geschaffene universale Sprache, die bereits ihre Vollwertigkeit und Brauchbarkeit bewiesen hat, annehmen und sie zum Schutze unserer Muttersprache international gebrauchen? Der Mensch kann in die Entwicklung eingreifen. Er kann sich seine verbindende Sprache wählen.

Ist es nicht eine hohe Aufgabe, im Dienste unserer Menschheitskultur diese verbindende Sprache zu verbreiten, damit sie rückbefruchtend allen Menschen und Völkern helfe?
Mor.

Por niaj legantinoj

Akrostikoj

„Akrostiko“, grekdevena vorto, signifas „verspinto“ kaj estas poezia ludaĵo, ĉe kiu la komencaj literoj (silaboj, vortoj) de strofo aŭ simile rezultigas vorton, nomon aŭ tutan frazon. La unua ĉi-sube publikigita akrostiko devenas de konata tre malnova (oni povus diri „klasika“) esperantisto M. Soloviev. Ĝi aperis en „Esperanto“, komence de 1949.

Konfeso

(Por albumo)

Mia devo estas diri
Indan veron, tamen tim'
Apud vi eĉ laŭte spiri
Metas min al ruza rim'.
Antaŭ vi mi buŝon baras,
Sen parolo, sen esper';
Vin evitas mi, eraras . . .
Inter grandliteroj staras
Nur por vi — silenta ver'!

(M. Soloviev.)

La dua, same rusdevena, estas prezentata originlingve. Ĝi havas la titolon

Возлюбленной в альбом.
 („Al la amatino en la albumon“).
Ĝia laŭvorta Esperanta traduko estas jena:

Vi volas scii, kiun amas mi —
Tion ne malfacile estas diveni.
Estu nur atenta, legante,
Pli klare mi ne povas diri.

La unuaj literoj de ĉiu verslinio rezultigas la rusan pronomon „teb-ja“ = vin.

Возлюбленной в альбом

Ты хочешь знать, кого люблю я—
Его не трудно отгадать:
Будь лишь внимательней, читая,
Яснее не могу сказать.

Ksantipo

Ksantipo estas opiniata klasika modelo de kverelema edzino. Ŝi fariĝis simbolo.

Sia edzo estis la famkonata Atenano Sokrato, kiun liaj kunurbanoj vokigis antaŭ tribunalon, ĉar liaj novaj sag-instruoj estis al ili tro strangaj. Lia morto faris lin nemortebla. Sed nemortebla kune kun li fariĝis ankaŭ lia edzino, „la kaprica kaj kolereza Ksantipo“.

Tre longan tempon daŭris, ĝis kiam oni ekkonis, ke la efektiva Ksantipo ne povas esti estinta tiel malbona. En 1715 la filozofo Heumann entreprenis publikan honor-restarigon por ŝi. Li skribis koncipe: „ . . . same kiel la edzino de Luther estis bonkora virino kaj bona kristanino, kvankam ŝi ne atingis la kvalitojn de sia edzo, same ankaŭ Ksantipo, ja malpli perfekta ol ŝia edzo, tamen estis bona edzino . . .“

Baldaŭ troviĝis voĉoj kiuj superis unu la alian je kompato. Ili faris Ksantipon suferintino kaj nomis Sokraton malbonkonduktulo kaj mallaboremulo.

En ĉi tio estas iom da vero. Sur la foirejo de Ateno li faris tiujn paroladojn, kiuj alportis al li ja gloron, sed nenion alian. Veraĵojn

oni ne kolportu kontraŭ mono, tio estis la malsaĝa opinio de tiu neordinara homo. Ŝi estis tre bone: multaj priridis la oratorantan kaj docentantan Sokraton, kies rondeta, diketa figuro kaj larĝa, platnaza vizaĝo tute ne konformis al la kutimaj imagoj pri ĉarmo kaj beleco, eĉ se ĉiu lia movo evidentiĝis la riĉecon de lia granda animo.


Bonenspezigaj oficoj estis je dispono de Sokrato. Sed li lasis pasi okazon post okazo motivante, ke li ne volas ŝarĝi sian konsciencon, ke li volas resti li mem. Sed lia edzino estus povinta pagi la tedajn ŝuldojn, ordigi la mastrumadon kaj pli bone flegi la infanojn.

Do, ekzemplodona dommastro kaj familiestro li ne estis. Sed krome li ŝatis noktan societon kaj ne estis

tre akurata rilate ĝustatempan hejmiron. Tial al Ksantipo certe ne mankis kaŭzoj por ofte kaj maldelicate diri al li sian opinion. Tamen pro tio ŝi ne bezonas esti nepre monstro.

Kiam Sokrato troviĝis en la malliberejo, Ksantipo fidele servis lin. Ŝi petis kaj petegis lin riski forkaron, kiun estis jam preparintaj liaj amikoj. Sed Sokrato preferis resti fidela al si mem.

Sed kiel okazis, ke Ksantipo malbonfamigiĝis tutmonde? — Dum ŝia vivotempo neniu historiisto atentis pri ŝi. Sed la postaj Sokratanoj Flopodis kiel eble plej bone reliefigi sian grandan ekzemplulon. Iu Ksantipo neniam kolereganta ne povis doni al sia edzo okazon por supercaj respondoj. Tiamaniere ekestis multaj anekdotoj pri Sokrato, sed nur longe post lia morto; malmultaj jaroj tiam sufiĉis, por prezenti Ksantipon kiel monstron, kaj kiel tia ŝi ankoraŭ nuntempe estas miskonata. Beko.



„Frühling läßt sein blaues Band wieder flattern durch die Lüfte . . .“

Aufnahme: Falk-Bildarchiv, Darmstadt

Fremdplanedanoj en „flugantaj subtasoj“

Mistera homrabo - Aventuro inter Tero kaj Marso - Hidrogenbomboj jam konataj surmarse Molkora Marsano

Jam de kelka tempo sensaciaj informoj kaj raportoj premas sin en la internacia gazetaro. Laŭ ili, usona kemiisto en Cihuahua-Meksikio asertas esti vidinta tiel nomatan „flugantan subtason“ direktatan de malgrandegulo kun kapego. — Ankaŭ el la ŝtato Ohio oni raportis, ke oni aere provis persekuti „flugantan subtason“. Raportisto -xyz- de Eŭropa gazeto intertempe havis supersensacian travivaĵon, kiu estas minimume tiel neverŝajna kiel la amerikaj gazetaraj raportoj. Por finfine forigi la lastajn klarajojn en ĉi tiu afero, ni ĉi-sube reproduktas specialan sensaci-raportojon, kiun skribis tiu raportisto tuj post sia rekonsciigo en malsanulejo.

La malvarmega, malseka nebulo buliĝis kiel venena amaso en la valoj de l' Eĵfel-montaro. Kun malespero mia motorbiciklo denove kaj denove sin boris en ĉi tiujn timigajn grizajn nebul-ondojn. Estis noktomezo. Certe mi senkonscie jam veturegis dum horoj. Mia kapo brulis kvazaŭ en fajro. Homoj, vilaĝoj, arbaroj preterflugis. Preskaŭ svenanta, mi denove kaj denove provis haltigi la maŝinon. Sed ĉiu manipulumovo, ĉiu piedpuŝo por funkciigo de la haltigiloj tuj estis vanigata de terura elektra bato tra mia tuta korpo. Mia energio senteble malpliĝis. Unu sola penso pli kaj pli enboris sin en mian cerbon: Mi estas en la manoj de nevidebla potenco! Mia motorbiciklo kaj mi estas tele-direktataj!

Kiam mi jam ne sciis, kie mi troviĝis, subite ekestis en mi nova sento. La gravitacio perdiĝis. Per mia lasta malespera forto mi tenegis la maŝinon. Sed jen subita ektiro min ŝiris for de la tero — mi flugis, flugegis rapidege, ĝis mi perdis la konscion . . .

50 000 km for de la hejmlando

Kiom da horoj paŝis de tiam, kiam mi denove vekigis? Mia kapo troviĝis kvazaŭ enkusenigita en butermola vitreca amaso. Malfermante la okulojn, mi ekvidis strangan estaĵon, ian malgrandan demonon kun grize-verda haŭto apud mia kuŝejo. Liaj eburecaj manoj eliĝis el tunikosimila vesto, deĝis de la gracia, eble unu metron granda korpo, leviĝis al la plafono de la ronda ejo kaj tie estingis lumvalvon, el kiu ĝis tiam ŝprucetis sur min reviviga gaso. Poste la manoj denove returnis sin obece al la korpo. La giganta kapo de la stranga etulo mallevis sin kaj flustris al mi en nekomprenbla lingvo. Konsternite mi rigardis en tiun vizaĝon ŝajne skulptitan de miljara bonkoreco dirante: „Kie mi estas?“

Ree la estaĵo sendis siajn manojn al butono ĉe la muro. Post kiam la nekonato denove estis parolinta per sia stranga lingvo, voĉo eksonis de el la butono: „Vi troviĝas en „fluganta subtaso“. Tiel vi homoj ja nomis niajn universospacajn ŝipojn. Mi venas rekte de la Marso kiel esploranto sur la Teron.“

„Kion vi intencas fari kun mi?“ mi demandis konsternite kaj aŭdis kun miro, kiel el la sama butono ĉe la muro nun miaj vortoj eliĝis en la nekomprenbla lingvo de la nekonato.

„Tion vi ja ekspertas“, li respondis al mi, „sed unue ni volas fari malgrandan interparolon ĉi-supre inter Luno kaj Tero, do en distanco de maksimume 50 000 km de via planedo.“

Kanonkugloj kaj V-pafaĵoj

„Nu, ekpafu viajn vortojn!“ mi rediris, sentante samtempe, ke mi tute ne povis leviĝi de mia kuŝejo.

„Restu trankvila sur via lito, por ke vi ne eliĝu el la sfero de la oksigeno, kiun ni eksprese por vi kunportis en nia ŝipo“, mi aŭdis lin diri. „Cetere, kial vi ĵus diris: ekpafu? Tio proksimigas nin tuj al tre grava afero. Mi devas ja esplori, ĝis kia rafinita punkto vi homoj evoluigis pafadon kaj militadon. Ni ja observis per niaj superteleskopegoj, kiel primitive vi masakris unu la alian ankoraŭ en via lasta mondmilito — sed laŭ lasta informo de la Marsa gazetara agentejo, la plej grava en nia Marsa ŝtato, ŝajnas ke vi intertempe faris tiel gigantan paŝon antaŭen, ke eĉ al ni, viaj najbaroj de la Universo, la afero fariĝis iom riska. Ĝis nun ni devis ankoraŭ kun granda peno per teledirektado — vi memoras vian propran veturadon, ĉu ne? — rekvizicii por niaj muzeoj kelkajn viajn murd-instrumentojn, kanonkuglojn, V-pafaĵojn kaj aerminojn. Sed nuntempe ni devas antaŭzorgi, ke ne dum via plej proksima milito viaj uranaj kaj hidrogenaj bomboj kaj raketoj dispecigu nian pacan planedon.“


„Mi vidas, ke ĉe vi, kvazaŭa anstataŭanto de la tuta homaro, eliĝas malvarma ŝvito“, rimarkigis milde la Marsano, sendante siajn manojn al malgranda kaŝita komutilo. Tuj tubo almoviĝis ĝis super mia buŝo, kaj trinkaĵo, miksitaj ŝajne el Triple sec, Haute Sauterne kaj nektaro kun ŝpruceto da viskio, fluus sur miajn lipojn. Mi dankis al la bonkora donacinto, kiu senĉese

havis larmon de kompato en siaj bonecaj okuloj, kiam li rigardis min.

„Do vi volas rekvizicii ankaŭ min por via muzeo?“ mi kuraĝis demandi la grize-verdan demonon. „Eble!“ estis la respondo. „Ni bezonas por niaj studadoj nun novan Teranon, post kiam nia lasta pro nekomprenbla facilanimeco kuris el sia oksigenkluzo en la liberan karbon-atmosferon de nia planedo kaj tie sufokiĝis.“ Larmino de senlima kompatado gutis ĉe tiuj vortoj de la giganta kapo de l' vireto sur min. „Sed por vi estas jam pli bone antaŭzorgite. Estas inventita aparato, per kies helpo vi povos vivi ĉe ni tute sendangere.“

Dum mi estis traskuata de atako de tremo, la Marsa spiono ree forsendis siajn eburecajn manojn tra la spaco, milde ridetante kaj dirante:

„Anstataŭ okupi nin per militado kaj atombomboj, ni Marsanoj eltrovis ion, kio igas la vivon de ĉiu unuopulo vera plezuro. Tuj post ĉies nasko ni injektas spiritajn



Desegnaĵo: Schneider

koncentrojn en ĉiun estulon tiakvante. Ĝis ties kapo efikas preskaŭ kiel sendstacio de cent kilohercoj. Poste ni foroperacias liajn manojn, kiuj de nun sub la direktado de la cerbo faras ĉiujn laborojn tute memstare, dum la cetera korpo vivas trankvile kaj la kapo ĝojas en belaj revoj.“

De la klubo ĝis T 34

La manoj de l' demono nun revenis kaj alportis por mi la oksigen-aparaton, kiun mi devis fiksi en la kravato. Poste la Marsano gvidis min plenfieri tra la fluganta subtaso. Mi admiregis la du gigantajn atom-motorojn de la universo-ŝipo kaj aŭdis samtempe:

„Ili estas movataj de litiohibrido, do de la sama materialo, el kiu vi fabrikas hidrogenbombojn kaj nenion alian.“

Ĉie en la interno de la subtaso estis tuboj, komutiloj kaj stranga ilaro el aluminea metalo. Tra fenestro montris al mi mia vartanto, ke ni ĝuste preterpasas la Lunon. Per blanka flago signalis de tie vera giganto . . .

„Cetere, mi volas permesi al vi rigardon al la Marsano anticipe. Mi montras al vi, kio al Terano milit-kutimiĝinta estos verŝajne plej interesa“, tiel denove mi sentis min alparolata. Sur blanka ekrano mi subite ekvidis potencon rondan domon.

„Jen nia muzeo, en kiu la ĝis nun konkeritaj produktaĵoj de la homoj estas ekspoziciitaj.“

Multajn konatajn objektojn de la homoj mi vidis nun, antaŭ ĉio armilojn. Ci tiu skalo etendiĝis de la prahoma klabo ĝis la T 54, kaj sur ĉiuj estis algluitaj tekstoj kun kompatema moral-instruo, kiujn la Marsa spiono al mi tradukis: „Ankoraŭ ili ne scias, kion ili faras.“

Poste li diris: „Rigardu, tie estas koncentrita la tuta milita proviz-trezoro de nia planedo, regata de paco kaj bonkoreco. Ni instalis ĝin antaŭ mil jaroj nur pro la batale-maj Teranoj: Du hidrogensuperok-sidaj bomboj! Sed ili sufiĉos, se iam ni estus atakotaj de viaj ekde 4 000 jaroj militemaj fratoj.“

Ordone de l' Marsprezidanto

Subite la grize-verda demono te-
rure ekmovis okulon, rigide rigar-
dante al blanka tabulo ĉe la muro.

Mallaŭte li murmuris antaŭ si di-
raĵon, kiun mi povis kompreni, ĉar
la tradukaparato ankoraŭ estis ko-
nektita: „Tuj la kaptitan homon re-
turne al la Tero! Li estas gazetra-
portisto, kaj estas klare, ke li
mensogas tro multe. Tio ne povas
utili al ni. Rekviziciu alian repre-
zentanton! Marsprezidanto.“

Furiozo la grize-verda demono
ekfunkciigis la returnmekanisman
en la atom-motoro, kaj ni ĵetegis
nin ree al la Tero. Dumvoje mi
devis bone atenti, ĉar la malgrande-
gulo daŭre provis sendi al mia vi-
zaĝo siajn flugantajn manojn. Sed
nelonge antaŭ la alteriĝo li ree
regis sin. Lastfoje li komutis la
tubon kun la miksaĵo de Triple sec,
Haute Sauterne, nektaro kaj viskio.

Nedireble mole la fluganta sub-
taso poste alteriĝis ĝuste sur tiu
loko, kie ankoraŭ kuŝis mia motor-
biciklo. La grize-verda demono
etendis al mi ankoraŭ unu fojon la

manon, kiun mi preskaŭ kunportis,
ĉar mi forgesis, ke ĝi estis mal-
fiksa. Larmon de adiaŭ-doloro li
gutigis ankoraŭ sur min. Poste min
trafis malskue paralizanta frapo,
kaj mi perdis la konscion. Nur en
malsanulejo mi ree konsciigis, kiam
sidis iu apud mia lito, kraketante
per gazeto... -xyz-

Rim. La redakcio kompreneble ne ak-
ceptas lan respondecon pri la ĉi-supra
tutpersona raporto. Tamen ĝi volas al-
doni (ap)-scigon el Lisbono, laŭ kiu
dekduoj da „flugantaj subtaso“ estis vid-
ataj meze de Marto de portugalaj bord-
gardistoj. Laŭdire, la „subtaso“ flugis
pli rapide ol la konataj brilsur-pafaĵoj
de la pasinta milito. Ankaŭ el Oporto,
Leixos kaj Duoro venis raportoj, laŭ
kiuj kelkaj personoj asertas esti vidintaj
„fajrajn globojn“.

De tiu tempo la raportoj pri „flugantaj
subtaso“ aŭ teleroj“ konstante plimul-
tiĝis en la tutmonda gazetaro kun ĉi-
specaj klarigoj, supozoj, konjektoj kaj
asertoj. Rezulto: Ankoraŭ restas la mi-
stero, la enigmo pri tiuj strangaj rapid-
flugaj objektoj en nia aerspaco. Kio
estas ilia veranatur? Aŭ ĉu ili eble ta-
men estas fremdplanedaj senditaĵoj?

Auf dem Büchertisch

Einzelne eingehende Bücher usw. werden erwähnt, doppelt eingehende besprochen

Wir lernen Esperanto, die Welt-
hilfssprache. Vollständiger Kurzlehr-
gang von W. und H. Wingen. 16 Sei-
ten Din A 6 mit steifem Umschlag.
Preis: —,30 DM. Erhältlich bei den
Verfassern, Köln-Sülz, Rankestr. 15.

Es gibt Leute, die haben wirklich keine
Zeit und möchten doch gern Esperanto
lernen; außerdem hat wohl jeder von uns
einen Bekannten, den er gern einführen
möchte in die „Geheimnisse“ unserer
kara lingvo, der aber zunächst ein etwas
größeres Lehrbuch nie zur Hand nehmen
würde. Solchen gebe man einmal das
obige Büchlein. Es enthält viel mehr, als
möglich erscheint, in kürzester und doch
vollständiger Form. Zwölf Lektionen mit
Lesestoff (interessantem Lesestoff!), Übun-
gen und der Tabelle auf der 3. Umschlag-
seite bilden den Inhalt; das Vorwort auf
der 2. Umschlagseite stellt eine aufklä-
rende Einleitung dar. Der Aufbau schließt
sich an die langbewährte Form des größ-
eren Lehrbuch-Bruders an: Beispiel,
Übung, Regel. Die Wörter muß sich der
Lernende selbst in einer ABC-Liste zusam-
menstellen, was m. E. kein Mangel,
sondern vielmehr ein Vorzug des Büch-
leins ist und sich zum Vorteil des Ler-
nenden auswirken wird. Der Preis ist für
jedermann ohne weiteres erschwinglich.
Das Büchlein dürfte auch für einen etwa
erforderlichen Schnellkursus mit Nutzen
taugen. JB.

La Juna Mondo, Informilo de la
Revejulo. Nr. 1, 1. Jahrg. Januar 1950.

Eine neue Esperanto-Zeitung ist ge-
boren. „Die junge Welt“ heißt sie. Klein,
bescheiden, ohne Ansprüche ist sie noch,
wie es einem Neugeborenen ja auch an-
steht. Hektografiert, knapp 4 Seiten. Eine
Anschrift ist nicht vorhanden, aber man
kann sich an Herrn Heinz Häck, Köln-
Dellbrück, Gräfenmühlenweg 7, wenden.

Entstehungsgeschichte: **Revejo** hatte
bisher ein eigenes Blättchen „La Reve-
lano“. Dies ist nun mit „La Ponto“ ver-
einigt. So mußte sich die Jugendorgani-
sation **Revejulo**, die bisher den Reve-
lano mitbenutzen konnte, selbständig
machen. Die Nummer enthält einen Vor-
spruch, einen kleinen Ausblick auf 1950,
etwas über Weltbürgertum und einen
(mehr ulkigen) Kleinanzeigenteil. Die
Seite für einen Esperanto-Lehrgang ließe
sich wohl besser verwenden.

Im neuen Blatt steht: Man gebe uns
eine Chance, und wir werden zeigen,
wie ernst es uns damit ist. Nu, gejunuloj
esperantistaj, jen ĝi! Elproftu ĝin! Jfb.

Gvidilo Oberammergau kaj Ettal.
Kleiner Führer von Oberammergau
und Ettal. 16 Seiten, Din A 6, illu-

striert. Erhältlich gegen 1 internatio-
nalen Antwortschein oder 30 Dpt
(West) bei der Geschäftsstelle der
Passionsspiele (Esperanto-Abteilung)
in Oberammergau oder beim Deut-
schen Esperanto-Bund in München-
Pasing.

Der kleine ansprechende Führer ver-
mittelt uns eingehende Kenntnis über
Lage, Geschichte und sonstiges Wissens-
werte von dem bekannten Kurort und
seinen weltberühmten Passionsspielen.

Pri tio vi ridas!

La juĝa protokolo

Juĝisto (al akuzito): Ĉu vi edziĝis?

Akuzito: Jes.

Juĝisto: Kun kiu?

Akuzito: Kun virino.

Juĝisto: Ne estu tiel malrespekta!

Tio ja estas memkomprenebla.

Akuzito: Ne diru tion, sinjoro

juĝisto. Ekzemple mi havas fra-
tinion, kiu edziniĝis kun viro.

En la tramo

En tramo sidis malgranda strat-
bubo apud tre eleganta sinjorino.
La nazo de l' bubo tute ne estis
pura; pro tio la sinjorino demandis
lin:

„Ĉu vi ne havas naztukon?“

„Ho jes, mi havas, sed mi ne
pruntedonas ĝin al fremdaj per-
sonoj.“

En ekzameno

Profesoro: „Sajnas al mi, ke la
demando estas tro malfacila.“

Kandidato: „Ne, sinjoro profes-
oro; ne la demaudo, sed la respondo.“

La pli granda malbono

Sinjoro (al amiko): Se via infano
vespere tiom krias, via edzino
endormigu ĝin per kantado.“

Amiko: „Ni jam provis tion, sed la
najbaroj petis nin, ke ni prefere
lasu la infanon krii.“

ebenso wie über das benachbarte Kloster
Ettal mit seinem Gnadenbild.

Das Esperanto ist stellenweise etwas
umständlich und bisweilen sehr an das
Deutsche angelehnt. Eine Reihe von Neu-
formen (beneficiato, klostro, prebendo,
prezopo, konsekri, celebri, kampanilo,
alba, azura) findet sich im Text. Die Be-
handlung der Eigennamen ist nicht ein-
heitlich, auch einige Druckfehler fehlen
nicht. Der „balsporto“ ist sicher ein
Übersetzungsirrtum statt „pilkosporto“.
Ich erwähne das alles, weil der Führer
die Bemerkung trägt: Lingve kontrolita
de la lingva sekcio de GEA.

Wäre es nicht besser, ein für allemal
die „Passion“ mit „pasiono“ (also: pas-
ionludo) wiederzugeben statt mit „pa-
sioludo“, das doch nur „Leidenschafts-
spiel“ bedeuten kann? Dies schiene mir
ein wirklich vertretbarer Neologismus zu
sein. Das großgeschriebene „Pasio“ kann
das Problem nicht befriedigend lösen.
Jfb.

Sercdemandoj

1. Kiun demandon oni neniam po-
vas jesi?
2. Kiajn ŝtonojn oni trovas en ri-
veroj?
3. Kiu aŭdas ĉion kaj diras nenion?
4. Kiu jaro daŭras nur tri mona-
tojn?
5. Kio falas en akvon tute senbrue?
6. La ĉielo havas ĝin, sed ne la
tero; la fraŭlino havas ĝin, sed
ne la sinjorino, la diablo havas
ĝin, sed ne Dio. Kio estas tio?
7. Kiu parolas ĉiujn lingvojn?
8. En kiujn barelojn oni ne povas
verŝi vinon aŭ akvon?
9. Kie maroj kaj riveroj ne havas
akvon?
10. Kio trapanetras fenestron ne
difektante ĝin?


Unsere Anzeigenpreise

Zeilenpreis: 0,20 DM
Für Kleinanzeigen Worttarif:
Korrespondenz, Familien-
anzeigen, and. Privat-
anzeigen je Wort 0,10 DM
Fettdruck je Wort 0,20 DM
Geschäftliche Klein-
anzeigen je Wort 0,20 DM
Fettdruck je Wort 0,30 DM
Dieser niedrige Tarif ermöglicht es
jedem, seine Wünsche in Anzeigen-
form zu veröffentlichen. Sie wer-
den mit dem Erfolg zufrieden sein.

Enigmoj kaj Pensosporto

Kombil-enigmo

a a a a a a
a, b, d d, e e
e e e, f, g g,
h, i i i, k, l l,
m m m m m,
n n n n n, o
o o o o o o, p,
r r r r r r, s
s, t t t t t t,
u u, v, z z. El
ĉi tiuj literoj
rezultas post
kunmeto hor-
izontale: kom-
enco de Za-
menhofa originala poemo; vertikale:
1. geometria linio, 2. diigi, 3. mal-
facila situacio, 4. raŭka spirado, 5.
fondinto de religio, 6. vira nomo,
7. speco de kostumo, 8. funkciigi
laŭ certa ordo. La vortoj de la
kombil-dentoj estas sen gramatikaj
finaĵoj. B.



Pensosporta enigmo

Kupea societo

Post Internacia Esperanto-Kongreso 6 partoprenintoj kune voja-
gis hejmen en unuaklasa kupeo,
kie ili okupis ĉiujn 6 lokojn, tri
kontraŭ tri. Ili estis profesoroj en
kemio, fiziko, matematiko, zoologio,
astronomio kaj medicino. Ili aj no-
moj, ne en la sama vicordo, estis
Karlsen, Nansen, Hansen, Jansen,
Jensen kaj Svenson. Mi donas pri
ili la sekvantajn detalojn:

1. Ciu legas libron, verkitan de
iu el la aliaj. 2. Karlsen legas
kemian artikolon. 3. Svenson legas
libron, verkitan de lia kontraŭa
najbaro. 4. Jensen sidas inter la

zoologo kaj la kemiisto. 5. Flanke
de Jensen sidas la medicinisto. 6.
Astronomo kaj kemiisto sidas unu
kontraŭ la alia. 7. Nansen legas me-
dicinan libron. 8. Karlsen sidas en
angulo. 9. Karlsen ne estas astrono-
mo. 10. Nansen sidas kontraŭ fizi-
kisto. 11. Hansen neniam legas ma-
tematikajn librojn.

Nun klopodu difini ĉies profesion.
(El „Esperanto“)

Solvoj de la enigmoj el n-ro 4 Lösungen der Rätsel aus Nr. 4

Kompletig-enigmo

1. k(li)ŝo, 2. fu(ng)o, 3. (va)kso, 4.
(ko)rvo, 5. (mi)opa, 6. pre(ta), 7. s(to)ko.
(Lingva Komitato)

Manĝema ĉevalo:
(H)aveno.

En printempo:
Du katoj, dukatoj:

Silbenrätsel

ab — di — di — di — fen — ge —
go — i — in — ka — ker — kus —
la — man — me — na — ne — nie
— o — on — ra — raum — ro —
setz — tein — ti — tru — un —
vol — zir.

Bilde mit diesen Silben 12 Wör-
ter mit jeweils sechs Buchstaben.
Nr. 10 ist das einzige Esperanto-
wort. Die Anfangs- und Endbuch-
staben von oben nach unten gelesen
ergeben einen Wunsch, den alle
Esperantisten beherzigen sollten!

- Männlicher altdeut-
scher Vorname
- Spott
- Wanderschau
- Farbstoff
- Name des Präsidenten
der USA
- Name einer Oper von
Lortzing
- Sprache des alten
Rom
- Steinbruchabfall
- Fotogerät
- Esperantowort: jeman-
des Würde verletzen
- Staatlicher Begriff,
Bezeichnung
- Verpflichtende Ver-
ordnung

Die Lösung dieses Rätsels finden
Sie ausnahmsweise diesmal schon in
der vorliegenden Nummer vorweg-
genommen, und zwar in Form eines
aktuellen Aufrufs auf Seite 35.

VS.

Mehe Esperantisten

werben Sie für Esperanto
mit unserem Flugblatt

Esperanto auf einem Blatt

27×36 cm groß, zweiseitig bedruckt.

Preis je Stück 5 Pf.

Esperanto-Abteilung
der Limburger Vereinsdruckerei
Limburg/Lahn

Ein Sprachführer für alle Gelegenheiten

Esperanto in der Tasche

Von Wilhelm und Hans Wingen

Deutsch und Esperanto

in folgenden Themen:

Begegnung / Allgemeine Redewendungen / Erkundigung nach dem Wege /
Reise / Hotel / Gaststätte / Aufstehen / Zeit / Familie / Verabredungen
/ Wetter / Stadtrundgang / Ausflug / Postamt / Bank / Zoll / Arzt / Der
menschliche Körper / Friseur / Kaufhaus / Kleidung / Haus / Briefwechsel
/ Esperanto-Bewegung / Vergnügen / Sport / Spiele / Technik / Maße
und Gewichte

12 x 23 cm (internationales Sprachführerformat), 48 Seiten mit Umschlag. Preis 1.60 DM
zuzüglich 16 Pf für Porto

Esperanto-Abteilung der Limburger Vereinsdruckerei,
Limburg/Lahn

DER LESEZIRKEL

für internationale Esperanto-
und englisch-amerikanische Zeitschriften

(Life, Time, Fortune u. a., Esperantozeitschriften aus aller Welt, wie Japan,
Island, Amerika, Australien, Deutschland u. a.)

nimmt für 1950 noch neue Mitglieder auf.

Niedrige Gebühren. Große Zufriedenheit der Mitglieder in 1949.
Gute Referenzen. — Genaue Auskunft gegen Rückporto durch

Josthenner Kaz, (21b) Siegen i. Westf., Postfach 156